

ELKRIO DE ŜAFETOJ

La kredo estas for! Tio estas vera krizo. Respondo de katolika patrino koncerne al provo de germanaj teologoj, kiuj volus novan eklezion.

Mezuro pleniĝis. Pli ol 220 bone salajritaj, plejparte pli aĝaj teologoj, kiuj sin nomas katolikaj kaj kiuj dum kelkaj jardekoj formas kaj influas junan katolikan adeptaron de pastreco, animzorgajn laborantojn, instruistojn de religio, sin starigis per malprudenta memorando kontraŭ nedubeblajn verojn de la kredo kaj instruo de la papo. Konkize dirite, ili volus pli da potenco kaj pli da amoro. Kaj tion ili disponigas al ni kiel reformon.

Nenio, kio estus por ni nova. Kiu el mia generacio (mi naskiĝis en tempo de la 2-a Vatikana Koncilio) ankoraŭ hodiaŭ kredas je Kristo, estas jam ekde lernejoj jaroj sin elmetita al herezoj. Estu ĝi instruo de religio, dimanĉa prediko, preparo al sankta komunio kaj konfirmacio, aŭ liturgio, komuneco de gejunuloj, asocio de virinoj aŭ eklezia gazetaro, ni al kutimiĝis, ke la veroj de la kredo kaj instruo estas misprezentitaj, mallongigitaj, bagateligitaj, kreive klarigitaj en mala senco, aŭ simple negataj.

Alkondukas nin tiuj memorandaj teologoj, eventuale iliaj spiritaj patroj, tiamaniere al pli profunda kredo je Kristo? Tute male. Ili per vojo de religia instruado ensemis en niajn infanajn animojn dubojn, ho ne, rekte la sendiecon. Dum ili per plena pezo de sia supozata scienceco neis, ke la kvar evangelioj parolas pri veraj okazintaĵoj, kaj elmontris ilin anstataŭ tio al la plej sovaĝigita interpretado, ili tre efike zorgis pri tio, ke al ni ne nur la vortoj de Jesuo, sed mem lia ekzisto ne plu sin montras kredinda.

La kredo kaj pieco iĝis la objektoj de moko. Tiu ĉi semado milionoble ekĝermis. Averaĝa hodiaŭa germana baptito koncedas, ke la papo estas bona homo, sed li aŭskultas, se li entute aŭskultas, pli volonte kun fervoro malgrandan kontraŭinstruan oficon el Tübingen aŭ el Münster, sur kies teologiaj fakultatoj hodiaŭ ja ili pli bone scias ol Jesuo

mem, kion do Jesuo volis. En pli bona kazo ili opinias Jesuon kiel bonan homon, kiun sendis Dio, por nin helpadi, kiel ni aranĝu feliĉan vivon ĉiu laŭ sia imago. Ĉi tie surtere, kompreneble.

Pri tio, ke Jesuo kiel Filo de Dio eniris en la homan historion, ke Li nin insiste instruis, ke Li sin disponigis pro la amo al ni je neeldirebla turmentado kaj sin oferis, por savi niajn animojn kontraŭ eterna disigo de Dio post la morto, nomata infero, kaj por alkonduki nin en eternan feliĉegon ĉe Dio, nomata ĉielo, pri tio plimulto el ni havas tute neniun imagon.

„Ho hu, hola, ni ĝojas, Dio ĉiujn amas.“ Tiel kaj simile al ni estis prezentata bildo de Dio. Peko, necesego de savo, ĉielo, infero, purgatorio ktp. – ĉio estas hieraŭa neĝo! Tiel elkreskis du generacioj de kritikecaj „katolikoj“, kiuj neniam en la vivo havis en la manoj kateĥismon, pri tio, ke ili ĝin havas en la kapo eĉ ne indas paroli, kaj tiuj ĉiuj tre bone konas tre citatan katolikan moralon pri sekso nur kiel rompopecojn el medioj, ĉar la kompletan instruon de la eklezio ili neniam eksciis, nek de paroĥestro, nek de instruisto de religio.

Ĉar neniu al ni diras, ke kun nia privata vivo ni povas antaŭ Dio tute fiaski, el tio por ni rezultas, ke neniu elaçeton ni bezonas. Tial ni komprenas dekalogon, inkluzive de la ekleziaj ordonoj, nur kiel rekomendon, sed ne kiel ion, pro kio ni devas klopodi. Tio estas kaŭzo, kial la preĝejoj estas malplenaj kaj pekkonfesejoj ankoraŭ pli malplenaj. La kredo estas for! Ĝi estas tiu krizo.

El ekleziaj impostoj oni pagas kreskantajn episkopajn aparatojn. Tiel povas pere de vicoj da kunlaborantoj kleriĝitaj en teologiaj fakultatoj disvastigi herezajn opiniojn per tuta multbranĉa eklezia organismo. Multaj bazaj pozicioj en katolikaj akademioj, kleri-

gaj domoj, episkopaj ordinarejoj kaj redakcioj de episkopaj gazetoj estas okupitaj per simpatiuloj de la teologia memorando.

Malfacile komprenebla estas, ke ĉi ĉio okazis kaj okazas antaŭ vidoj kaj respondecdecoj de la episkopoj. Profesoro de dogmatiko Manfred Hauke, sperta fakulo en tiu ĉi sfero, konstatas: „Respondeculoj en la eklezio, antaŭ ĉio multaj episkopoj, dum tutaj jardekoj sin tenis kiel uzantoj de komputilo, kiuj ne eluzas antaŭvirusan protekton. Figure dirite „la virusoj“ ruinigas komputilon. La krizo de la eklezio estas antaŭ ĉio krizo de la episkopoj, kiuj malatentas sian respondecon.“

Tio aspektas tiel, kvazaŭ la pligrandigitan respondecon, kiun donis al la episkopoj la koncilio, ili transdonis pluen al Germana Episkopara Konfereco. Granda parto de episkopoj volonte ŝatas sin kaŝi malantaŭ kolektivo de tiu ĉi konferenco. Kiel aliel kompreni, ke kontraŭ la nuntempa aŭdiĝo de la teologoj, kiuj postulas nenion pli malgrandan ol protestantismigon de la eklezio, el 27 episkopoj sin unusence esprimis nur kelkaj malmultaj?

Ĉu verdire ne estas la unua tasko de la episkopoj protekti la eklezion kontraŭ malamikoj, kiel eksteraj, tiel enternaj? Kel-

kaj episkopoj, ekzemple episkopo Bode, esprimas ja eĉ malfermite simpatiojn kun „reformatoroj“, aliaj kapjesas prefere kaŝite. Ĉu eble estas tiel, ke eksplodas antaŭlonge preparata skismo?

En tiu ĉi mizerstata situacio sonorigas alarme laikoj kaj interreto. Iuj kunigitaj pere de „facebook“ kaptis ganton jetitan fare de memorandistoj kaj spontanee kreis peticion „Pro Ecclesia“, kiun ili adresis al episkopoj kaj kiun povas subskribi ĉiu, kiu firme staras post la eklezio kaj posteulo de sankta Petro. Ni legas per interreto paroladojn de la Papo kaj ni konsciigas, kion li foje diris ankoraŭ estante kardinalo:

„Nur ĉi tie sin montras demokratia principo, kiu estas entenita en kerno de la instruofico: estas al ĝi ordonite defendi la kredon de la simplaj kredantoj kontraŭ potenco de intelektuloj.“

Kaj tiel en ĝoja atendado de vizito de la Papo en Germanio kuniĝas perinterrete ni homoj, kiuj eĉ ne konas sin reciproke, sed ni havas komunan kredon, kiu ne estas individualisma nek selektiva, ĉar temas pri la kredo de la eklezio, kiu trairas ĉiujn tempojn kaj estas same malnova kaj nova. Kaj tial mi kun ĝojo subskribis peticion „Pro Ecclesia“ kaj malabonis nian eklezian gazeton. ■

Vatican - Magazin